

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL

BARCELONA-HISPANUJO

**AVIZO:** La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

**ENHAVO:** En Sukceso. — Raporto de la unua kongreso de katalunaj Esperantistoj en Sabadell. — Kongresaj Amuzadoj. — Tri komunikadoj. — Balado. — La sesa kongreso en Washington. — Enlanda Movado. — Gazetaro. — Oficiala parto.

## EN SUKCESO

**L**A Unua Kongreso de Katalunaj Esperantistoj okazis sukcesplene. Kaj ne estas nia aljuĝo fakto, kiun al ni vidigas nia natura entuziasmo por tio kion ni kontribuis okazigi, sed la rezultatoj atingitaj per la ĉies klopodo.

Se ni estus el tiuj homoj, kiu kontrolas la sukcesojn per la amasoj de homoj partoprenintaj en la okazado de manifestadoj de ideoj; se ni estus el tiuj homoj kiuj unike aljuĝas per la eksteraj manifestadoj, vere nia Unua Kongreso ne estus kronita de gloro. Sed ni kontrolas la valoron de la okazaĵoj per tio, kio estas ĝia vera animo, ĝia vera vivo, ĝia vera valoro: kaj estas nediskutebla ke la valoro intima, efektiva, de nia Unua Kongreso estas en tio, kio determinas la vojon alkondukantan al plej baldaŭa atingo de la celo por kiu ni entuziasme klopodas; estas en tio, kio elmontras kaj vidigas ke apud ni, flankon ĉe la flanko estas amaso de lertuloj, de kuraĝuloj kiuj senhalte, senripoze laboras por nia Esperanto kaj por la peroj alkondukantaj al nia idealo, t. e. al Esperanto, kaj al pli grandigado de «K. E. F.»; estas sindonemuloj grandnombre kiu staras ĉe la piedoj pretaj por konkeri tion, kio estas por ni taŭgaj elementoj por la disvastigado de nia internacia lingvo kaj por alvarbi tiujn elementojn

kiuj plifirmigos nian estontecon. Kaj pro tio ni fiere asertas ke nia Unua Kongreso estis triumfo, kaj en la triumfo de la Kongreso estas ankaŭ, kompreneble, la triumfo de «K. E. F.»

Kaj tio ni ne konstatis nur en la urbo de la Kongreso, sed ĉe en la eksteraĵo: ne estas unike ni, kiuj proklamas ke nia organizado estas inda de la celo por kiu ĝi estis fondita, kaj ne unike ni, esperantistoj praktikaj, kiuj jesigas ke ĝi estas honorebla kaj ĉefa, sed la elementoj kaj organizadoj fremdaj al nia societo, la organizadoj kiuj estas la riprezentantoj de la urboj kaj ĝiaj direktantoj.

Jen; ĉiuj la kongresistoj per si mem tion povis konstati en Sabadell: tie lia Moŝto la urbestro je la nomo de la urbo deklaris sian protektadon al esperantistaro; la «Gremi de Fabricants» (Korporacio de Fabrikistoj), la «Escola Industrial» (Industria Lernejo), kaj la Centre de dependents del Comerç i de la Industria» (Societo de Komerĉindustriaj Oficistoj) proklamis ankaŭ sian bonvolecon kaj favoron por Esperanto — kiel ni raportas en alia loko de «K. E.» — kaj krome, dum la Kongreso oni sciigis ke lia Moŝto la Urbestro de Tarragona, je la nomo de la Urbestro petis al la Kongreso okazigi la Duan Kongreson en tiu ĉi fama kaj historia urbo. Kion pli ni povus esperi?


Ne estos de nun la esperantistoj kiuj devos iri de loko en lokon peti bonvolecon kaj favoran akcepton por nia ideo; ni konstatas ke la tempo alvenis, kiam nia konstanta agado komencis frukti; ni konstatas ke fine la ĉefaj elementoj de la urboj kaj sekve de Katalunlando komprenis ke ni ne batalos por utopio; oni fine deklaras ke ni estas forto kaj oni esperas de ni, konsekvence, agadon kaj sukceson.

Ni ne dormu sur la laŭroj: pro tio, ke ni ne estas herooj, pro tio, ke ni devas konkuri aliajn fortojn aliajn helpilojn, ni ne siestu! Nune pli ol antaŭe ni devas plej fervore klopodi, kaj en ĉia estanta klopodo ni sentos stimulon, kaj konsekvence saĝnapremion, pro tio ke ni konkeras praktikajn kaj videblan celojn.

Ni pretiĝu por ke en la Dua Kongreso de «K. E. F.» ni atingu plej valoran konkerojn; ni pretiĝu por korespondi al sindonemeco de la urbo Tarragona kiu deziras krom kunhelpi nin, nin ĉirkaŭbraki; ni pretiĝu senhalte por pli enradikigi nian «K. E. F.», t. e. Esperanto.

La Dua Kongreso de Katalunaj Esperantistoj estos alia triumfo!





UNUA KUNSIDO ĈE LA GRANDA SALONO DE LA SABADELL'A URBDOMO

## RAPORTO DE LA UNUA KONGRESO DE KATALUNAJ ESPERANTISTOJ EN SABADELL

**T**iu ĉi Revuo, organo de la «K. E. F.» ne estas kiu devas komentarii kaj apologii la taskon faritan de la organizintoj de la Federacio kaj de la kongresistoj: al ni nur apartenas priskribi la laboron faritan per maniero klara kvankam konciza, por ke ĉiuj, same tiuj kiuj plenaj je sankta entuziasmo klopodadis kaj klopodadas por doni formon kaj vivon al la «K. E. F.», kiel tiuj aliaj, kiuj pro malgrandanimaj egoismoj, antipatioj personaj aŭ de partio kontraŭagis ĝian fondiĝon, povu juĝi la aferon juste kaj klare.

Tamen, ni ja devas konstati noble kaj malkaŝeme ke nia agado tute nin kontentigis kaj kuraĝigis por la estonto, ĉar ni havas firman konvinkon pri tio, ke alvenos tago, ne multe malfrua, en kiu kuniĝinte ĉiuj katalunaj esperantistoj ĉirkaŭ ni, ni ĥavos tian tutan forton necesan por atingi unu el niaj celoj, kaj montri, ke la kataluna esperantistaro estas unu vera sola familio.

Kiel estis anoncita per la oficiala organo de «K. E. F.» kaj kelkaj Barcelonaj ĵurnaloj, je la deka kaj duono matene alvenis ĉe la fervoja haltejo kelkaj samideanoj el Barcelono, Terrassa, Manlleu, Vilanova i Geltrú, Barbarà del Vallès, Vic, Tarragona kaj el aliaj urboj por partopreni en la taskoj de la Kongresaj Kunvenoj.

Ili estis atenditaj de niaj Sabadell'aj samideanoj, kiuj ĝoje man-premis la ĵus alvenintojn, kaj post la rubrikaj salutoj oni organizis gravan manifestacion kiu preskaŭ trapasis la tutan urbon vekante la scivolemecon de la urbanaro pro la esperantaj flagoj kiujn kunportis niaj Barcelonaj amikoj.

Unue, ni estis akceptitaj ĉe la instrua societo «Centre de Dependents del Comerç i la Industria» kies prezidanto Sro. D. Saló, post nia prezentado farita de la maljuna sabadell'a esperantisto Sro. A. Miralles Gual, gratulis kaj dankis al la «K. E. F.» por okazigi ĝian unuan Kongreson en Sabadell, kaj li finis dirante, ke la domo de ilia societo estas je la dispono de «K. E. F.». Sro. D. Dalmau el Barcelono, je la nomo de ĉiuj, esprimis la dankecon kiun ni sentas por tia grava prezento.

Tuĵe ni iris ĉe la gravan societeton «Gremi de Fabricants», en kies domo jam nin atendis sia prezidanto Sro. M. Duràn i Folguera, la sekretario-advokato Sro. G. Casals i Pena, kaj Sro. A. de P. Campmany. Sro. Duràn akceptis nin laŭdante Esperanton, lingvo kiu estas difinita, — li diris — por faciligi inter la popoloj el la plej malsamaj lingvoj la interrilatojn kaj la interŝanĝojn de industriaĵoj kaj komercaĵoj. La Komerca Ĉambro (sekcio de tiu ĉi societo) jam de longe akceptis Esperanton kiel internacia lingvo.

Sro. Delclos el Vic, dankis je nia nomo al Sro. Duràn pro siaj laŭdindaj paroloj por Esperanto, kaj rekomendis al ĉi tiu sinjoro ke la grava societo kiun li prezidas influu por ke esperantajjn kursojn estu donataj ĉe la «Escola Industrial» el Sabadell, respondante sinjoro Duràn ke li klopodos por efektiviĝi nian proponon. Poste la sekretario Sro. Casals montris al ni tre antikvajn dokumentojn datumitajn dum la XV.<sup>a</sup> jarcento, kiuj montras la antikvecon de Sabadell pro la fabrikado el lanteksaĵoj. Alia vizito estis farita al la «Escola Industrial d'Arts i Oficis» kie la klera sabadell'a esperantisto Sro. A. Lagarriga, per elokventa parolado prezentis la kongresistojn al la profesoroj, al kiuj li ankaŭ rekomendis nian lingvon por ke Ĝi estu instruota en tiel grava lernejo. Respondis la profesoro de meĥaniko Sro. Cortada je la nomo de la profesoroj, ke ili ĉiuj penos por ke dum la venonta kurso 1910-11, la deziroj de ni esprimataj havu efektivecon.

Nia lasta vizito estis por la Urbeŝtaro, ĉe kies domo akceptis nin



la Urbestro Sro. F. Grieria kaj kelkaj urbkonsilantoj al kiuj nin prezentis nia inteligenta samideano Sro. D. Serdà, kiu facilmaniere paroladis dirante ke, dum ĉiuj tempoj la sabadella Urbeŝtraro simpatiis kun nia ideo, elmontrante tion, ke, se la urbkonsilantoj estas la esprimo de la urbo, nia tuta urbo estas enperantigita, pro tio, ke neniu urbkonsilanto neis al nia afero sian helpon, kiam ni ĝin petis por nia propagando. Sro. Urbestro post saluti al la kongresistoj diris ke Sabadell'o ne havas grandajn aleojn, riĉajn konstruaĵojn, ĉion kio ornamas aliajn urbojn, sed tamen ĝi havas grandan junularon kiu sin priokupas ne nur pri la materiala laboro propra de urboj industriaj sed ankaŭ pri la venko de ĉiuj noblaj ideoj kaj artoj. Li finiĝis dirante: «tiu ĉi domo estas la domo de la urbo kaj mi je ĝia nomo diras, vi estas en via hejmo». Sro. J. B. Albiñana, dankis al la Urbestro la varmajn parolojn al ni dediĉitaj, promesante ke ni ĉiuj restos ĉiam dankemaj pro la gastemeco de Sabadell'o. Poste ni vizitis la diversajn urbajn oficejojn, akompanitaj de kelkaj urbkonsilantoj, ĝis nia eliro por iri tagmezmanĝi. Estis la unua kaj duono, kaj la unua kunsido devis okazi je la tria posttagmeze.

## 1<sup>a</sup> KUNSIDO

La kunsidoj okazis en la ĉefa salono de la Urbodomo. Prezidis ambaŭ kunsidojn Sro. Johano Piferrer, kasisto-administranto de «K. E. F.» kaj en sia dekstra flanko sidis Sro. J. B.<sup>a</sup> Albiñana, Sekretario, kaj maldekstre, Sroj. A. Badia, Vic-prezidanto, kaj Sro. J. Ustrell, Vic-kasisto-administranto.

Je la 4.<sup>a</sup>, Sro. Prezidanto malfermis la kunsidon. Li klarigis al multenombra ĉeestantaro ke nia estimata efektiva Prezidanto, Dro. J. M.<sup>a</sup> Terricabras, ne povis ĉeesti kaj sekve prezidi la Kongreson, tial ke urĝaj neprokrasteblaj devoj de lia kuracista profesio katenigas lin en Viko. Li petis pardonon al Sroj. gekongresistoj, dezirante al Kongreso bonan sukceson.

Sro. J. B.<sup>a</sup> Albiñana, ekkomencas la legadon de la raporto pri la klopodoj entreprenitaj ĝis la starigado de «K. E. F.».

Tiu ĉi raporto plej detale klarigas kial la organizintoj entreprenis la fondon de «K. E. F.», kaj plie liveras al ĉiuj la celojn por kiuj povas la federacianoj klopodi.

Ĝi estis aplaŭdita je la fino, kaj unuanime akceptata.

Sro. Johano Piferrer, Kasisto administranto, legis sian raporton pri financoj de «K. E. F.», kiun ankaŭ estis aprobita. Ni ĝin konigis katalune al niaj geabonantoj, kaj gefederacianoj.

La sama samideano, konigis poste la nomaron de la delegitoj de «K. E. F.» la nombron de gefederacianoj, kaj la aliĝintaj grupoj, laŭ la jena ordo:

*Delegitaro de «K. E. F.»:*

Sro. Delfi Dalmau, de *Barcelona*; Sro. Joaquim Garriga, de *Sabadell*; Sro. F. Mestres, de *Vilanova i Geltrú*; Sro. A. Bach, pbre., de *Vic*; Sro. J. Puigbonet, de *Barberà del Vallès*; Sro. M. Espar i Boquer, de *Balaguer*; Fino. J. Massagué, de *Cambrils*; Sro. Josep Pi, de *Olot*; Sro. B. Pineda, de *Terrassa*; Sro. Ll. Coll, de *Manlleu*; Sro. J. Molas, de *Tarragona*; Sro. P. Alsina, de *Premià de Mar*; Sro. F. Blanquer, de *Castellar del Vallès*; Sro. J. M. Brú, de *Tivissa*; Sro. Ll. Margenat, de *Sant Llorenç Savall*; Sro. J. Coll, pbre., de *Sant Feliu de Codines*; Sro. J. Solá, de *Mataró*; Sro. J. Ximinis Guri, de *L'Escala*; Sro. J. Cardona, de *Berga*, Sro. E. Aguadé, de *Reus*.

La nomaro de gefederacianoj kaj grupoj aliĝintaj al «K. E. F.», ni ekkomencas ilin publikigi en la 2.<sup>a</sup> kaj tria paĝo de la kovertoj.

Pro tio, ke multaj el la aliĝintaj grupoj speciale komisiis privatan delegiton por ĉeesti en la Kongreso kaj partopreni en ĝiaj kunvenoj, Sro. Prezidanto permesis al ili paroli al la gekongresistoj. La grupaj delegitoj estis:

Sro. C. Urbez, el «*Espero Kataluna*», *Barcelona*; Sro. J. Serra, el «*Laboro Esperanta*», de *Vilanova i Geltrú*; Sro. J. Guillomia, el «*Uiam Antaŭen*», de *Sant Martí (Barcelona)*; Sro. J. Pujol, el «*Escola Ŭniversitaria*», de *Barcelona*; Sro. M. Lafuente, el «*Kvinpinta Stelo*», de *Barcelona*; Sro. J. Arnella, el «*Esperanta Nesto*», de *Barberà del Vallès*; Sro. J. Casajoana, el «*Komerca Fako*, de C. A. de D. del C i de la I.», de *Barcelona*; Sro. J. Molas, el «*Tarragono Esperanta*», de *Tarragona*; Sro. A. Martí, el «*Esperanto Semo*», de *Sabadell*; Ptro. A. Bach, el «*Vika Esperantistaro*», de *Vic*; Sro. Ll. Coll, el «*Esperanto Amo*», de *Manlleu*; Sro. S. Margenat, el «*Monta Grupeto*», de *Sant Llorenç Savall*; kiuj varme esprimis sian bondeziron kaj sukceson al «K. E. F.», kun plena fido atingi per la ĉies kunhelpo nian celon.

Poste, la Prezidanto anoncis ke, ĉar la organizintoj de «K. E. F.», deziris ne plu daŭrigi en la estraro de la Federacio pro tio ke sia organizada laboro jam finiĝis, kaj pro la aliaj kialoj klarigitaj en la raporto legita de sinjoro la Sekretario, la Kongreso devas elekti la novan Komitaton por la periodo 1910-11, kaj li permesis kvin minutojn da libertempo por ke la gekongresistoj interkonsentu pri tiu afero.

Laŭ la balotado rezultis elektitaj Sroj. J. Bremon Masgrau kaj J. Pujol Montfort, el *Barcelono*; Sro. J. Delclòs, el *Vic*; Sro. J. Piferrer Rifà, el *Sabadell*; kaj Sro. V. Alavedra, el *Terrassa*.

Ni devas rimarki ke ĉi tiuj Sroj. estis elektitaj preskaŭ per la voĉ-donaĵoj de ĉiuj, kio vidigas la interkonsenton de la gefederacianoj pri tiu afero.

Poste la sekretario legis du komunikaĵojn rilate al la loko kie ni devas kunveni en la venonta jaro.

Unu estis de la grupo «Vika Esperantistaro», kaj la alia de la Tarragona Urbestro.

«Vika Esperantistaro» invitis nin por nia Dua Kongreso per varmaj vortoj. La delegito el Tarragona diris ke, ne nur estas la Urbestro, kiu invitas al ni sed ankaŭ la Provinca Deputataro, kaj la societo «Atracció de Forasters», promesante ke ni estos tre bone akceptitaj, pro kio, ĉiuj akceptis ke nia dua Kongreso okazos en Tarragona dum la venonta jaro.

Kun tiu ĉi decido oni finis la unuan kunvenon, kaj la prezidanto invitis al la gekongresistoj por ke ili ĉeestu al la nokta festo, ĉe la salonoj de la societo «Ateneo».

## 2<sup>a</sup> KUNSIDO

Ĝi komenciĝis je la dekunua matene sub la prezido de Sro. Piferer. Tiu ĉi sinjoro post peto de kelkaj kongresanoj, kiuj bezonis foriri tagmeze al Barcelono kaj deziris partopreni en la diskutado de la temo prezentita de Sro. Serdà, kies temo estis en la kvina loko de la programo, proponis ŝanĝi ĝian ordon en la senco ke, la temo 5.<sup>a</sup> estu unue diskutata; kaj tiel aprobite, li cedis la parolon al Sro. Graupera el Sabadell, kiu legis la verkaĵon de nia amiko.

Jen kiel parolas Sro. Serdà, pri sia temo «Kun la celo stimuli al la Kataluna Esperantistaro, estus utila organizi esperantajn literaturajn konkursojn premiante la plej bonajn verkaĵojn (originalaj aŭ tradukitaj?). Projekto kaj maniero por organizi tion».

«Mi konstatis ke kio pli taŭgis por la disvastigado de la Kataluna lingvo inter katalunoj, ke kio pli taŭgis por instigi al katalunoj skribi katalune siajn verkojn, estis la «Floraj Ludoj» aŭ Literaturaj Konkursoj.

Kiu tion neos, tiu ne konas la veron. Tamen mi ne forgesas ke ne ĉiuj verkoj estis premiitaj en tiaj konkursoj kaj eĉ ĉiujn poetojn kaj prozistojn ne konigis al ni, tiu ĉi de la Katalunoj tiel ŝatata festo. Sed mi estus devigata fari multajn konsideraĵojn rilate al tiu afero. La ĉefa kaŭzo estas en la maniero kiel oni aljuĝas la verkojn, ĝenerale, en tiaj konkursoj. Mi tion konstatis de tre proksime, kaj mi sperte povas preparoli tiujn aferojn. Pro la *protekto al amikoj* niaj konkursoj kata-

lunaj fariĝis, ĝenerale ridindaj, kaj fariĝis infanaj ludoj, ĉefe tiuj kiujn oni okazigas en eksterbarcelonaj urboj. Ili fariĝis kiel necesega afero por niaj «Ĉefaj Festoj», kaj tiuj festoj rilatas al ni, kio rilatas al aliaj popoloj la «bovoviraj kuradoj».

Ni vidas, do, ke niaj katalunaj konkursoj havas flankon taŭgan kaj maltaŭgan; flankon utilan kaj malutilan: ni sciu elĉerpi la bonon, la taŭgon kaj la utilon por atingi per tiuj konkursoj en Esperanto, bonfaran agadon, kaj instigi per ili al niaj kamaradoj verki kaj perfektigi kiel verkistoj kaj kiel esperantistoj, ilin stimolante samtempe per rekompenco kaj distingo.

Taŭgas adapti al ni tiun ĉi peron por atingi de la katalunaj esperantistaj verkistoj, kiuj ne sentas inklinon liveri sian utilan laboron al ceteraj esperantistoj mallertaj, ke ili sentu sin de ĝi allogita, kaj povu ni tiel akiri aron da stilistoj se tio estas eble, kaj liveri samtempe literaturon riĉan kaj ekzemplan kiel originalan kaj tradukitan.

Cetere, per tiuj konkursoj ni starigos agrablan kaj mirindan feston, kiu montros ke Esperanto scias eltiri profiton el tiuj aferoj kiuj montras utilecon efektivegeblan, kaj starigante samtempe belan kaj sukcesan feston.

Jen la detala projekto:

Mi konsistigus la konkurson el du partoj:

*Ordinaraj temoj* kaj *Ehsterordinaraj temoj*.

Por la Ordinaraj temoj mi difinus:

Premio al plej bona kanto al *Amo*.

Premio al plej bona proza *Literaturaĵo*.

Premio al plej bona tradukita *Poezio*, el Katalune.

Premio al plej bona tradukita *Prozaĵo*, el Katalune.

Pri la du lastaj estos antaŭe difinitaj la verkoj por traduki.

Rilate al unua temo difinos premion la «K. E. F.», kaj rilate al la tri ceteraj, la organizintoj kune kun la loka kongresa komitato klopodos, por ke premion estus difinita de societoj aŭ personoj el kie okazos la Kongreso kaj la «Literatura Festo».

Mi donas tian preferon al tradukaĵoj, — ĉu en prozo, ĉu en verso — ĉar mi juĝas ĝin meritinda, pro tio, ke ne estas facile — laŭ mia opinio — verki perfektan tradukaĵon. Eble viavice, vi kredos ke estas multaj malfacilaĵoj por aljuĝi konscie, kiun el multaj alsenditaj tradukaĵoj estas la plej bone tradukita. Mi rimarkis ke en sama verko tradukita de malsamaj homoj, oni ĉiam konstatas ĉe kiu la stilo estas plej pura, la elturniĝoj pli belaj kaj harmoniaj, kaj la spirito de la verko pli fidele translokita kaj interpretata, kaj ĉe kiu tiu *savoir faire* tiel propra kaj karakteriza de la bonaj tradukistoj kaj de la aŭtoroj



mem, estas trovebla. Tiujn ĉi malsimilecojn kiujn mi citis, krom aliaj, mi konstatis en du Esperantaj tradukaĵoj faritaj de malsamaj tradukintoj de unu sola originalo. Pri la kapableco de la tradukintoj estas nenia dubo, ĉar unu estas Sro. Grabowski kaj Sro. Kabe la alia. La tradukita originalo oni trovas en la Enkondukanto, de Grabowski, kaj en *Pola Antologio*, de Kabe, sub la titolo *La Ŝimo de l' Mondo*.

Antaŭe mi devas konfesi que mi nek iomete konas la polan lingvon; sed en la atenta kaj kompara legado de ambaŭ tradukaĵoj, oni rimarkas — laŭ mia aljuĝo — ke tiu de Grabowski estas laŭlitere, dum tiu de Kabe ŝajnas, ke la tradukinto sciis tiel fidele interpreti la senton de la originalo, ke li atingis eltiri la tutan belecon kaj la senton; li ilin proprigis al sia personeco de esperantisto, kaj ilin disvolvis tiel belmaniere, tiel akurate, per floriaesprimado, ke la pli malsperta homo ekkrius: «jen verko skribita rekta en Esperanto; jen verko skribita en patra lingvo, en lingvo kun kiu oni sentis, suferis kaj amis.» Ĉi tiu estas la impresoj kiujn mi sentis dum mia komparo.

Alian detalon mi povas ankoraŭ prezenti al vi. Antaŭ ne multe la «Germana Esperantisto» malfermis konkurson-ekzercon. Ĝi konsistis traduki el la germana lingvo artikolon originale verkitan de doktoro Foerster; kaj ĉu vi scias kiu plej bone ĝin tradukis? Do, Sro. Carlo Bourlet, franco. Vi vidas, sekve, ke ne estas tiel facila afero esperantigi, kaj pro tio la tradukado meritas konsideron kaj gravecon. Oni bezonas krom perfektan elkonadon de la lingvo tradukota, plenan elkonadon de tiu al kiu oni tradukos; oni bezonas plie, prilingvan kulturecon kaj posedi facilecon de esprimado kaj de kompreno, kiujn ja estas malsimilaj en ĉiuj tradukintoj, pro tio ke ĉiuj ne posedas ilin egalajn, kaj kies malegaleco mi opinias ke ne estas malfacile aljuĝi. Kaj tion, kion mi konstatis ĉe esperantaj tradukaĵoj, kaj ĉe aliaj lingvoj, vi sendube ankaŭ konstatis.

Kiel *Eksterordinaraj Temoj*, mi akceptus ĉiujn, kiujn societoj, grupoj au individuoj prezentas al ni kunigante premion al ili. Tiaj Temoj devas sin rilati al Esperanto aŭ al io koncernante al Ĝi.

Rilate al aljuĝado de manuskriptoj — kaj tion mi parte prunteprenis al «Esperantistaj Floraj Ludoj» — oni povus organizi laŭ la jena formo:

Prezidanto de la Konkurso: Sinjoro la Prezidanto de «K. E. F.»

Aljuĝantaro: — Rajtigi la Direktantan Komitaton de «K. E. F.» por ke ĝi ilin elektu, el kiuj oni nomos Sekretarion.

Pri la aljuĝantaro. — Ĉiu aljuĝanto estos samtempe: 1.<sup>a</sup> juĝanto de una temo; 2.<sup>a</sup> juĝanto de dua temo; kaj 3.<sup>a</sup> juĝanto de tria temo;

t. e. li estos juĝanto de 3 malsimilaj temoj en malsimila ordo de aljuĝado, de tiuj temoj kiujn li antaŭe estus elektintaj kiam oni estus al li petata sian konkurson kiel aljuĝanto. Esceptinte la Prezidanton kaj la Sekretaron, la aljuĝantaro povos partopreni en la Konkurso unike en la temoj kies aljuĝontoj ili ne estos. La Prezidanto kribados la al li alsenditajn manuskriptojn: la plejbonajn verkitajn li sendos al 1.<sup>a</sup> aljuĝonto. Tiu ĉi ilin sendos post aparta klasifikado, al 2.<sup>a</sup> aljuĝonto de la sama temo, kiu faros ankaŭ sian klasifikadon kun klarigaj rimarkoj pri la manuskriptoj kiujn li opinias premiindaj. Tiun ĉi klarigojn kaj klasifikadon li verkos sur aparta papero (enfermata en koverto, kiun li sendos kune kun la aljuĝotajn manuskriptojn al 3.<sup>a</sup> aljuĝonto. Tiu ĉi agos kiel la 2.<sup>a</sup> sen malfermi la koverton entenanta la raporteton de ĉi tiu, kaj li sendos ĉion — t. e. manuskriptoj, raporteto de la 2.<sup>a</sup> aljuĝinto kaj la sia — al la 1.<sup>a</sup> aljuĝinto, kiu legos la raportetojn de la ceteraj aljuĝintoj kaj komparos ilin kun tiu de li farita. Li — la 1.<sup>a</sup> aljuĝinto — verkos lastan raporton pri la de li farita laboron, kiun kunigos al la manuskriptoj kaj sendos al la Prezidanto.

En okazo de malkonsento inter la aljuĝantoj, la Prezidanto decidus.

Pri la cetero, mi sekvos la katalunan kutimon.

Jen, karaj gekongresistoj, mia propono. Se vi opinias ĝin inda, ĝin reformu aŭ ĝin akceptu entute; mi bonvole akceptos viajn reformojn al ĝi, se la gekongresistoj ankaŭ ilin akceptas. Mi restos tre kontenta se «K. E. F.» prenas sur sin ĉi tiun feston, kaj se mian celon oni atingas, mi sentos la ĝojon de tiu kiu plenumis sian devon.» —

*D. Serdà.*

Ptro. Bach, el Vic, proponis ke ne estu la komitato de «K. E. F.» la komisiito por nomi la juĝantaron kaj laŭokaze decidi kiaj devas esti la verkoj premiitaj, sed ke por tio oni nomu ĉiaman juĝantaron kiu povus konsisti el personoj famekonataj en la Kataluna esperantismo, kies nombro pligrandiĝadus dume eliradus novaj kompetentuloj, rajtiginte prefere por eniri en tian juĝantaron la poliglotojn.

Sro. Serdà rimarkis al Ptro. Bach ke en okazo de konsento pri tio, kion proponis tiu ĉi, neeviteble kreiĝus oligarkio el kelkaj memrajtigitoj kies volo superus ĉiujn; kaj lia kompreno konsistis je tio ke la juĝantoj devus esti ŝanĝataj, por tiel profiti la personajn ecojn de ĉiu esperantisto, kiu dezirus esti preta por juĝi temon laŭ sia kompreno.

Sroj. Dalmau kaj Colet estas je la sama opinio kiel Sro. Serdà.

Sro. Pujol proponas ke la komitato de «K. E. F.» nomu la juĝantaron.

Sro, la Prezidanto kredas, ke la komitato de «K. E. F.» nur povus nomi la prezidanton por la aranĝo de literatura konkurso.

Sroj. Serdà kaj Figuerola klarigas kelkajn punktojn pri la organizado.

Sro. Albiñana diras ke la Kongreso devas ĉiujare nomi la juĝantojn.

Sro. Serdà akceptas tiun aldonon kun la klarigoj, ke la Kongreso devas nomi ĉiujare tri organizantojn de literaturaj konkursoj, kiuj poste nomos la juĝantaron.

Tio estas aprobita por ĉiuj, kaj la prezidanto permesas kvin minutojn da libertempo, por ke la Kongresanoj interkonsentu pri la tri organizantoj, kiuj oni devas nomi, rezultante esti post baloto, Sroj. D. Serdà, el Sabadell, J. Rosals kaj F. Pujulà el Barcelono.

Pri la temo «Ĝi estas necese ke «K. E. F.» havu du delegitojn en ĉiu urbo por plibonigi ĝia disvastiĝado?» de Sro. J. Palmerola el Vic, parolis anstataŭ ĝia aŭtoro Sro. Delclos dirante ke povas okazi ke delegito malsaniĝas aŭ pro siaj aferoj, devas lasi la urbon, kaj «K. E. F.» restas sen delegito en tiu loko.

Li proponas do, starigi vic-delegiton por anstataŭi la delegiton, kaj ankaŭ helpi lin, ĉiuokaze.

La Kongreso decidas post la paroloj de kelkaj kongresanoj, ke la delegitoj mem nomu la vic-delegitojn anoncante tion al komitato de «K. E. F.» por la aprobo de la nomoj.

Sro. Dalmau defendis la temon de Sro. J. Ximinis Guri el L'Escala (Girona), kiu proponas starigi komision por klarigi la dubojn pri Esperanto, kiujn ofte havas la esperantistoj kiuj loĝas en urboj ne havantaj societojn esperantajn.

Pri tio la Kongreso decidis, ke anstataŭ komisiono, estu la oficiala organo de «K. E. F.» kiu devas respondi aŭ klarigi la dubojn pri gramatiko, malfermante sekcion en kiu ĉiuj gefederacioj estas petataj respondi ĉiujn demandojn. En okazo kiam la demandoj ne estos respondataj de niaj legantoj, la redakcio mem ilin respondos.

Sro. Martí legis sian raporton pri la temo «Ni devas propagandi konstante kaj ofte en la ĉiutagaj gazetoj, precipe en la Barcelonaj, pro tio ke ili estas la plej legitaj» kaj por ke niaj legantoj vidu la sencon de tiu temo ni publikigas ĝin sube.

«Mi ne pretendas, karaj geamikoj, per mia mallonga parolado, longe laŭdi la meritojn de la Propagando, tute konvinkita ke vi ĝin

konsideras kiel la plej bona ilo por igi enradiki kaj kreskadi ĉiujn ajn teoriojn kaj ideojn. Kaj kiam ni konsideras que Esperanto ne estas ankoraŭ atinginta la altegan lokon kiun Ĝi meritas pro siaj grandaj kaj geniaj ecoj, ni devas peti la helpon de la Propagando se ni ĉiuj volas ke la bela internacia lingvo estu nune respektata kaj estimata kiel ĉia verko naskita de la studado kaj la logiko; ke la muroj de ĉiuj lernejoj iĝante eĥoj, longe kaj senfine ripetante la vorton Esperanto, tiu ĉi estu kun entuziasmo akceptata de ĉiuj geinfanoj, se ni volas, fine, ke, en proksima estonteco, kiel luma diino, forigu la konfuzon kiu, kovrante la homaron kun malluma mantelo, malpermesas ke la popoloj tute povu sin kompreni.

La plej bona ilo por propagandi estas, sendube, la gazetaro, tiu ĉi direktilo de la publika opinio, laŭ kies volo la urba vivado ĉu restas gaja kaj trankvila, ĉu sentas varmajn dezirojn de malamo kaj ribelo, ĉu iĝas entuziasmoplena pro la sciigo de ia ajn grava elpensajo. La gazetaro, do, devas esti la altega piedestalo de kie la Esperantismo proklamu senĉese al la mondo la regadon de la progresado kaj frateco, la publika tribuno kiu ĉien dissemu nian idealon. La «Kataluna Esperantista Federacio» havas sian revuon; sed tiu ĉi perfekte plenumos sian devon se atingas — kion sendube ĝi atingos — antaŭenirigi la entuziasmon de ni ĉiuj kaj, samtempe, sciigi al la fremda mondo esperantista ke, en nia Kataluna nacio, kreante literaturajn geniajn verkojn, fervore laborante por la progresado de la aliaj belartoj; malsuprenirante en la grandegan kaj profundan maron de la Scienco kaj akceptante la renovigemajn idealojn kiel ankaŭ ĉiujn manifestadojn de kulturo kaj antaŭeniĝo, estas malkvieta popolo kiu batalas kaj sopiras por la libereco de sia patrujo.

Nia gazetaro, la gazetaro por la propagando, devas esti la ĉiutaga kaj ĉieiranta, la Barcelona gazetaro kiu sendube akceptos ĉiujn esperantaĵojn elirotajn el la multenombro da plumoj de la Kataluna esperantistaro. Doktrinaj artikoloj, opinioj de eminentuloj, kronikoj pri gravaj faktoj kiuj tute klare pruvas la praktikon kaj utilecon de Esperanto, estas temoj por kies devas ne manki certe la necesajn argumentojn kiuj, ne nur pligrandigos la esperantan rondon, sed ankaŭ konvinkigos tiulojn al kiuj, parolante pri la internacia lingvo la nescio florigas en siaj lipoj ironian rideton.

Seke mi proponas: ke la direktanta komitato de la «K. E. F.» elektu la federacianojn kiuj, pro iliaj specialaj ecoj, plej bone scios propagandi per la gazetaro; kaj, samtempe, — se ne momente, pli antaŭnelonge almenaŭ — malfermu konkurson, kiel faris la «Germana Esperantisto», en kiu oni premios la propagandan artikolon: plej bone



verkitan. Tio, por la federacianoj, estos kiel sprono, kiu ilin devigos batali per la gazeta propagando. Batali estas vivadi, amikoj, kaj nur per nia senĉesa batalado

la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.

ANTONI MARTÍ

el *Esperanta Semo*

Post malgranda diskutado estis aprobita tiun temon, kaj atendi la Duan Kongreson por plenumi la duan parton de la temo kiu rilatas al la premio por la plej taŭga artikolo el la aperintaj en la ĉiutagaj ĵurnaloj.

La kvara temo, proponita de nia pioniro Sro. F. Pujulà Vallès pri la kreo de *Maristan Komisionon* por propagandi Esperanton en la maristoj el la eksterlandaj ŝipoj, kiuj vizitos la Barcelonan havenon, per *Ĉefeĉaj* ŝlosiloj, la aŭtoro prezentis la ĉi suban verkaĵon, ĉar sia saneco ne permesis al li ĉeesti en niaj kunsidoj.

«Estimataj gesamideanoj:

Mi bedaŭras, ke la malsano retenas min hejme kaj malpermesas al mi ĉeesti persone en tiu ĉi Kongreso, el kiu tiom da bonaj aferoj — mi estas certa — naskiĝos por la boho de nia individua moralo kaj de la ĝenerala movado de Esperanto en nia lando.

Mi estas devigata klarigi al vi la sencon de mia propono; tial mi petas bonvolu senkulpigi, ke mi trouzos kelkajn momentojn vian atenton. Aliparte, via senkulpigo estos des pli facile donebla, ke mi ne parolos longe.

Neniu el vi bezonas grandajn nek malgrandajn argumentojn por konvinkiĝi, ke la ĉefa celo de esperantista grupiĝo estas la propagando, la propagando, kaj ĉiam la propagando.

Bedaŭrinde, ni ne ankoraŭ atingis la temon kiam ni tute simple uzos Esperanton ĉu por nia plezuro ĉu por niaj bezonoj. Bedaŭrinde ni ankoraŭ estas en tro granda malmultenombro. Amasoj, centoj, miloj da personoj pasadas apud ni sen ia ideo pri Esperanto en iliaj cerboj! Nia tasko ne estas finita. Apenaŭ ĝi estas en la komenco. Ni devas propagandi ĉie, ĉiam, al ĉiuj! Propagandi senhalte, senripoze, senlace, obstine!... Kaj nun, kiam lumo ŝajnas aperi sur nia lando, kiam ni fine komprenis ke unuiĝo estas forto, kiam ni ekhavas kun Federacio gravan instrumenton de disvastigo kaj propagando de niaj ideoj, ni devas profiti ĉiujn niajn fortojn kaj alcentrigi ilin al nia ĉefa celo.

La sperto montras al ni, ke la propagando, kiun oni faras al

fremdulo estas pli efika ol tiu, kiun oni faras al enlandano. La profetoj ĉiam estas fremdaj. Ĉe ni, ni povas rimarki kun kia indiferenteco samlandano nia aŭdas pri la aprobo al nia lingvo de nia eminenta literaturisto Joaquim Ruyra. Sed rimarku, kiel grande li malfermas la okulojn, kaj kiel ronde li rondigas la buŝon, kiam vi certigas al li ke la urbestro de *Fuji-Oma* aŭ de *Aŝeki-Lakama* aŭ de iu alia elpensita de vi vilaĝo de Japanujo, estas esperantisto!

Tiu ridinda inklino de la animo, ne estas apanaĝo nia. Ĝi estas homa! En ĉiu popolo, en ĉiu lando okazas same! Kial do ne profiti tiun malvirteton por efikigi nian propagandon?

La fremduloj ne mankas ĉe ni. En nia haveno ni akceptas ĉiutage unu aŭ du fremdajn ŝipojn kun iliaj respektivaj maristaroj.

Ili venas de malproksime. Ili ofte tute ne konas nian lingvon. Ili kunportas malnovajn ĵurnalojn: librojn, kiuj estas multfoje legitaj... La fremdaj homoj multe pli legas ol niaj. Promenu tra la kajoj de la marbordo kaj vi vidos ilin — post la laboro — sidantajn sur la ferdeko, legantajn ĉu por instruiĝi ĉu per kontraŭbatali la tedon... Ha, se ni povus enŝovi en iliajn manojn unu el tiuj mirindaj Ĉefeĉaj ŝlosiloj! Certe ĝi restus legita! Kaj certe tiu semo florus kaj fruktigus!

Mi estas certa, ke mi ne bezonas ĝeni vin plu! ke via konvinko jam ekzistas!

Kreu tiun komisionon, kiu tre certe ricevos helpon de ĉiu lando, kiu tre certe disvastiĝos al ĉiu haveno de la mondo kie estas esperantistoj, kiu nepre fariĝos internacia!

Mi ŝparas al vi la tedon de klarigoj pri ĝia funkciado, kiurj mi rekte donos al la sindonemaj samideanoj, kiuj sin proponos por tiu meritinda tasko. Mi diris. — *F. Pujulà.*»

La Kongreso ricevis per aplaŭdoj tiun ĉi temon kaj kore akceptis ĝin kune kun la personaj proponoj de ĝia aŭtoro, sed kun la klarigoj ke nun «K. E. F.» ne povas difini monon por tia propagando, ĝis la dua Kongreso, ĉar nune «K. E. F.» devas plifirmigi ĝian krediton.

Plie, tiu komisiono estos sekcio de K. E.

La temo sesa, proponita de grupo «Lumon» el Tarrasa, pri la enkonduko de Esperanto ĉe la Oficialaj Institucioj, kiel Industriaj Lernejoj, Universitatoj, Komercaj Ĉambroj, k. t. p., okazigis iom da diskutado, ĉar kelkaj kongresanoj opiniis ke tiu tasko estas pli facila al la lokaj grupoj ol por la komisiono, kiun, proponas krei tiu ĉi temo, kaj malgraŭ la bona defendo ke de la temo faris Sro. Colet, el «Lumon» la kongreso decidis rekomendi al la lokaj grupoj ke ili laboru por la atingo kiun celas tiu temo.

Post la temaj diskutoj, Sro. Piferrer proponis al la Kongreso esprimi la plej sincerajn dankojn al la Sabadell' a Urbeŝtaro pro ĝia morala kaj materiala helpo al «K. E. F.» kaj ankaŭ sendi salutan telegramon al Majstro Zamenhof, je la nomo de la Kongreso. La kongresistoj aprobis ĉiujn tiujn ĉi proponoj.



## KONGRESAJ AMUZAĴOJ

**D**IMANĈON vespere la gekongresistoj solenigis la Kongreson per vespermanĝo kiu okazis en la «Hotel d'Espanya».

Nokte ili estis invititaj ĉeesti en literatura festo organizita de niaj sabadell' aj samideanoj je ilia honoro, kiun prezidis nia nova komitatano Sro. Delclòs.

La vastan salonon de la «Ateneu de Sabadell», kie okazis la festo, plenigis la geesperantistoj, kiuj avide aŭskultis la partoprenintojn. Sro. Dalmau faris apologion de Esperanto, komentariante samtempe la aldiraĵojn de niaj kontraŭuloj kun pravaj kaj konvinkigaj argumentoj.

Sro. Albiñana, per originala poezio *Deliro de studento*, prezentis belan verketon en kiu studento miksas kaj konfuzas la klarigojn en ekzameno, pro kio li atingas malsukceson. La subtileco kaj bonhumoro de tiu poezio ridigis kaj amuzis ĉiujn.

La sabadell' a samideano, la romantikulo — la de la fatalo ekbattita amiko J. Altura Pujada, tiu junulo kiu antaŭ longe baraktas sin kontraŭ tia malbona sorto, kaj kiu malgraŭ sia volo fariĝis okaza skeptikulo, ankaŭ partoprenis per originala verko *La Dona i l'Esperanto* kiun legis lia amiko J. Torra. Lia prozaĵo estas, laŭ nia aljuĝo, la unua ekrido kiun la amiko faras al sia jus entreprenita nova vivo; ĉar ja estas nova kaj alloganta vivo por koro poeta la atingo de amanta fianĉino kiu estas ĝentileco kaj subtileco: la atingo de dorlotema estaĵo kiu scios, ni ne pridubas tion, gajigi kaj ĝojigi la ekzistadon de nia agema amiko, kiun la fatalo grizigis antaŭtempe lian junecon. La de li disvolvita revo ŝajnas himno al virinoj, ŝajnas la dankesprimado al tiu fraŭlino kiu sciis doni al li esperon kaj kuraĝon, kiu sciis forgesigi al li la de li suferitan pasinton. Ke ĝi estu por lia bono!

Nia redaktoro Sr. Martí volis ankaŭ-li la fama flirtanto de la belo,

de ridoj kaj virinoj—festi en tiu nokto la virinoj kaj veki en la koro de la fraŭloj—eĉ eble en sia propra koro—la senton al amo. Kaj por tion atingi li legis *Leteron de amo*, tradukita prozaĵo elĉerpita en la libro *Romantics d'ara* de la kataluna verkisto Enric de Fuentes. Ĉu li trafis? Espereble: ĉe la fino, sur la vizaĝoj de ĉiuj gefraŭloj estis ekrideto de aprobo, eĉ sur tiu de la ironia kamarado Martí.

Poste samideano Ll. Coll, el Manlleu, legis poezion el *Krestomatia*



FELKAJ KONGRESANOJ KAJ SABADELLAJ ESPERANTISTOJ EN LA ARBARO  
«CAN FEU»

kaj originalan tradukaĵon, per kiu nia malnova Manlleu'ano montris sian lertecon traduki.

Sro. Pujol, la simpatia samideano ĵus elektita Sekretarion, tiu fraŭlo kies partoprenado en la Kongresaj kunsidoj esperigas al ni ageman kunhelpadon kaj laboradon, improvizis paroladeton per kiu li dankis al kongresistoj sian elekton.

Fine, la festo-prezidanto Sro. Delclòs, dankis al alestantoj ilian ĉeestadon, kaj sciigante ke la Sabadell'anoj regalos ilin per *lunch*.

La festo finiĝis per dancado, en kiu ne mankis *La Rondo*. Kaj estas komprenebla ke la festo finiĝus tiel, pro tio ke la plej multoj



estas gefraŭloj, kaj la simpatio reciproka multan fojon postulas esti esprimata apud orele. Niaj fraŭloj ja estas ĝentilaj, kaj malgraŭ ili ne estas tiel lertaj ĝentijuloj kiel spertaj esperantistoj, ili klopodis por ke la festo estus estinta festo de gajeco, kaj ho ve! himno al Amo; sed ne al Amo: al amindumado, kiu ja estas ŝatata de la gefraŭloj, sed, ne havas tiom da adeptoj. tiel fervoraj Je la 1<sup>a</sup> matene ĉiuj dissiĝis.

Kiel postkongresan ekskurson oni organizis ekskurson al kamparo en kiu partoprenis la gekongresistoj multenombre. Malgraŭ la postagmezo ne estis tiel ridema kaj gaja kiel estis estinta la mateno, malgraŭ la suno lumis tra nebulo, kaj la finiĝo de l'tago iom griziĝis, tamen ĝi ne influis en la promenantoj, kaj la gajeco estis nia devizo. Kaj tia devizo ne estis kiel devigata aŭ altrudita al ni afero, sed tute simpla naiva gajeco kiun al ni liveris la plenumita kun sukceso tasko, — tio ja influis sur nin — kaj nia natura ĝojo, ĉar la geekskursantoj estis ĉiuj junaj. Kaj vi ja scias ke en aro de gejunuloj seriozaj nur sufiĉas unu sola gaja karaktero por sukcesi gajigi la ceterajn ŝajne mistikulojn kaj por foririgi la seriozecon kaj fariĝi ĉiuj ardanta ĝojo.

Estis interesa kaj samtempe alloganta vidaĵo tiu, kiu aperis kontraŭ niaj okuloj de observemulo, kiam ĉe la kamparo sen antaŭa konveno, ĉiuj la gesamideanoj kuniĝas iom post iom laŭ la karakterinklino aŭ pensomanieroj, aŭ tute simple laŭ simpatio! Pli ol unu mi vidis, kiu kvazaŭ flirtanta abelo elektanta la floron por suĉi, iris de unu al alia areto, elektis inter ĉiuj, por fine trovi sian taŭgan kamaradon inon, kaj estas ankoraŭ ĝojiga afero, rimarki kiel oni preparolis pri ĉio, kio koncernas al Esperanto ĉe ni, kiel oni preparolis pri ĉiuj punktoj indaj de rimarko de nia internacia lingvo, pri trafitaj tradukitaj vortoj, pri literaturo, pri ĉio, jen. Se la temo ne estus estinte tiel alloga, kiom bele silenti kaj aŭdi kaj aŭskulti nur! Sed multan fojon nia volo ne estas superreganta kaj la forto de la entuziasmo ĝin kontraŭstaras kaj venkas ĝin. Mi rimarkis — kaj ne estas la unuan fojon — ke la kamarado pro aspekto ne klera, nelerta, en kies okuloj la forto interna ne helas, subite vekigis kaj lia vekigo ŝajnas aŭroro por vi kiu lin juĝis male... Estas en tio sensacioj kiujn la koro tuje ilin kaptas por resenti ilin poste en la soleco, en la intima ĉambro de hejmo. Sed estas alia plej intima ĝojo kiam en karaktero humila, en simpatia vizaĝo oni vidas okulojn humanajn, montrantajn ne vulgaran kleracon, kaj oni konstatas ke la de vi eltrovitan kecojn estas realaj. Ĉion tion ĉi mi elpruvis en tiu-ĉi ekskurso, krom la akiron de novaj geamikoj. Kiam ree, mi sabadell' ano, laŭ kutime vizitos novan fojon la kvietaj, silenta, majesta arbaro; kiam mi laŭ kutime iros sidi ĉe la rando de «el pla de l'Amor» (la ebenaĵo de

l'Amo) kontraŭ tiuj altegaj rektaj pinoj, ĉio ŝajngos al mi la postkongresan ekskurson: mi ree vidos la amikojn en ludo — kvazaŭ ili estus infanoj — mi ree vidos kiel gefraŭloj kolektiĝas sub kverkoj kaj senorde sidas sur la de la folioj tapiŝita planko, mi ree aŭdos la spritaĵojn de ĉiuj, kaj sen ia dubo la bloveto similos al mi la paroladojn de estaj-oj kiujn mi amas, kaj sen ia dubo la bloveto ŝajngos al mi kanzonon: la kanzono de la feliĉo. Kak kiel mi sciĝis de estimata poeto, mi ree iros sur tiuj vojoj kiuj vidis min feliĉa, por ke la sur vojrandojn falinta feliĉo ree min feliĉigus...

La adiaŭo alvenis, kompreneble: mi sentis nenian bedaŭron pro la dissiĝo, pro tio ke la «ĝis la venonta Kongreso en Tarragona» restis ĉe mi kiel espero. Kaj tiu ĉi espero ŝajngas al mi, ke la dua Kongreso okazos morgaŭ mem, sed en morgaŭo tute proksima, en morgaŭo kiu ne estos paco kaj kvieto, sed alsopiro kaj laboro.



### TRI KOMUNIKAĴOJ

Majstro Zamenhof post la apero de K. E. salutis al ni per tiu ĉi varmaj vortoj.

«Karaj Sinjoroj! La du unuajn numerojn de la KATALUNA ESPERANTISTO mi ricevis, kaj mi dankas; al la Federacio kaj al ĝia organo, mi deziras la plej bonan prosperadon. Via, *Zamenhof.*»

Jen la respondo al la telegramo kiun ni sendis je la nomo de la Kongreso:

«La Unuan Kongreson de Katalunaj Esperantistoj mi kore dankas la saluto, kiun ĝi sendis al mi. Via, *Zamenhof.*»

#### ALCALDIA CONSTITUCIONAL DE TARRAGONA.

Ĉar oni esprimis al tiu ĉi Urbertraro la deziron okazigi en nia urbo la proksiman Esperantistan Kongreson, mi havas la honoron prezenti al vi nian moralan kaj materialan kunhelpadon, kiujn estos je la atingo de nia Urbeŝtaro, en la kazo ke vi elektu nian urbon.

D. g. al V. m. j.

Tarragonon la 14<sup>an</sup> Majon 1910<sup>a</sup>

La Urbestro,  
*Pedro Cobos.*

Sro. Prezidanto de la Kongreso de «K. E. F.» en Sabadell.

BALADO

Katalune verkis, J. López Picó.

Estis en la ekkomenco...

Ombro de la Nokto estis memfida bruna belulino. Vizaĝe ĉielen, kun la malligitaj haroj akvofale falantaj sur la malkovritaj ŝultroj, ŝi viglis la iradon de la steloj.

Kaj en la sereneco de ŝiaj okuloj veturis la astroj, kvazaŭ en firmamento de duondormo. Ombro de la Nokto, per etenditaj brakoj benis la ripozon de la mondo.

Ĉe la mondo ĉio floris.

La Vento estis amema kaj ĝentila fraŭlo. Li ŝatis ludojn kaj ŝatis spritajojn pri amindumado. Li sciis pri la mistero de la arbaro kaj la ensorĉado de la supromontoj. Li konis de la maro la tuta malavaran vastecon.

Li estis parfumita de la bonodoro de malproksimaj landoj.

En la sereneco de la ripozo la Vento kantis.

La Ombro enamiĝis je tiu kanto. Ŝi iĝis floro de deziro meze de la nokto.

Kaj la Vento svenis ĉe ŝiaj brakoj, ĉar li estis malsperta en aferoj pri amo.

...Diris la Vento sidanta ĉe la piedoj de la multe amata: «— Mi parfumos viajn harojn per la bonodoro de la arbaroj; mi faros vian dormadon malpeza per la kanto de la marondoj, mi ornamos por vi liton per la floroj de ĉiuj ĝardenoj»...

Kaj la Ombro respondis: «— Mi donos al vi la stelojn; mi donos al vi la pacon...»

La Ombro de la Nokto kaj la Vento sin kisis...

...Poste, ilia aminterparolado daŭris ankoraŭ...

—Ni havos filon kiu estos amo kaj lumo: mi lin enkondukos rigardi la taglumon kaj mi montros al li la limojn de la tero...

Li estos superreganto sur ĝi.

—Ni havos filon kiu estos ĝentileco. Mi restigos lin kun mi kaj mi volos lin lernigi kalkuli la astrojn... Kaj mi aŭskultigos al li

la malpezan spiron de la tero, kaj la ritmon de la vivo, kaj la plaŭdon de la akvo kunportanta freŝecojn kaj revojn, kaj la festojn de la kreitaĵoj en la mallumo.

La dezirata filo ne naskiĝis. Estis pala filino bruna kaj malsprita. Ŝia patro, la Vento, vidis ŝin nur unu fojon... Poste li foriris ŝin forlasante.

Ombro de la Nokto kisis sur la frunteto ŝian filinon kaj ankaŭ forlasis ŝin.

De post tiam, la Vento iĝis furioza kaj kruela. Li ĉion vipas kaj forkuras tra la mondo en dolora frenezeco. Krie li vokas sian perditan amantinn.

Ombro de la Nokto estas suspektema kaj perfida, malvarma kiel sfinkso.

En la fundo de ŝiaj malhelaj okuloj nuboj kaj teruraj fumamasoj disiĝas. Ŝi etendas la brakon kaj palpas en la malplenecon.

La malpleneco al ŝi ŝajnigas amatan figuraĵon.

La astroj akceptis kiel fratinn la palan filinon brunan.

En la kvieteco de la nokto ĉio kantas...

Kaj tiel estas la kanzono:

La palbruna luno  
en funebra vest'  
ŝin vokas la panjo  
ŝin volas la patr'.

*Esperantigis*  
XAVIER SIMÓ



## LA SESA KONGRESO EN WASHINGTON

ALVOKO!

14-20<sup>an</sup> de Aŭgusto 1910

**P**or plene montri la utilecon de Esperanto en la Internaciaj Kongresoj estas necese, ke kiel eble plej multe diversaj nacioj kaj lokoj estu reprezentataj. Ni devas montri, ke kongresanoj el ĉiuj partoj de la mondo povas facile interparoli kaj interkompreniĝi sole per la Internacia Lingvo.



En la Sesa Kongreso estos ankoraŭ pli necese, ke Esperantistoj ĉeestu el kiel eble plej multe diversaj nacioj de Eŭropo, Azio kaj Suda Ameriko, ankaŭ el Kanado, Meksiko, kaj ĉiu ŝtato en Usono. Tio estas superege dezirinda en la Usona Kongreso, ĉar kvankam oni diversloke en Usono uzas ĉiun Eŭropan lingvon krom la angla, oni faras ĉion kaj veturas ĉien en nia vasta lando, uzante nur la anglan lingvon. Tial la Usona publiko ne tiel profunde sentis la bezonon por internacia komunikilo kaj ĝis nun ne devis akcepti Esperanton tiel generale, kiel ĝi estas jam akceptita en multlingvaj regionoj.

Tial ni petas la Esperantistojn en ĉiu lando, regiono kaj urbo de la mondo, ke ili estu reprezentataj de almenaŭ unu kongresano ĉe la venonta Kongreso. Ni proponas, ke ĉiu Esperantisto, kiu ne povas mem ĉeesti la Kongreson, donu iomete da monhelpo al iu elektita Esperantisto en sia urbo aŭ regiono, kiu havos la libertempon por veni, kaj kiu volonte venos por reprezenti siajn najbarojn ĉe la Kongreso, denonte al ili formalan raporton, se nur ili ĉiuj iom helpos lin pri la elspezoj de la vojaĝo kaj de la loĝado en la Kongresourbo.

Tuj grupigu vin, kaj elektu iun, kiu estos via reprezentato, kaj kies elspezojn vi prenos almenaŭ parte sur vin. Momoru, ke la Sesa Kongreso okazos en iu el la ĉefurboj de la mondo antaŭ la okuloj de la registaro de Usono kaj de la ambasadoroj de la aliaj nacioj de la mondo. Se ni faras bonan impreson sur ĉi tiun registaron kaj la ambasadorojn, tio multege helpos al la Esperantista Afero. Se la Usona Registaro vidos klare, ke Esperanto estas taŭga kaj praktika, kaj ke ĝi komencu mem uzi Esperanton, kiel oficialan internacian komunikilon. Estas grava devo de ĉiu Esperantisto en la mondo helpi en ĉi tio! Ĉu vi ne tuj komencu?

*La Vojaĝo.* — La Universala Esperantista Asocio afable konsentis aranĝi la detalojn de la vojaĝo de Eŭropo ĝis Nov-Jorko. Ciu, kiu intencas ĉeesti la Kongreson, sin turnu al tiu Asocio (8, *rue Bovy-Lysberg, Genevo, Svisujo*) por informo pri biletoj, kosto, k. t. p. Oni devus tuj fari tion, ĉar estas preskaŭ ĉiam necese aĉeti la ŝipbiletojn du aŭ tri monatojn antaŭ la foriro de la oceanŝipo. La veturado de Nov-Jorko ne kostos pli ol dek dolarojn (20 Sm.). Kredeble ni ricevos pli malgrandan prezon, se estos sufiĉe granda nombro da kongresanoj.

*Loĝado.* — La Organiza Komitatovolonte faros aranĝojn por la kongresanoj pri loĝado, k. t. p. La hotelo «Arlington», kiu estas rekte trans la parko Lafayette kaj tre proksime de la «Blanka Domo», estos la konstruaĵo, en kiu troviĝos la akceptejo k. t. p., kaj en kies grandaj haloj okazos kelkaj el la kunsidoj de la Sesa. En ĉi tiu hotelo la specialaj prezoj al kongresanoj estos la jenaj:

Loĝado sen manĝada (nomita «European Plan»): Unu ĝis du dolaroj (du ĝis kvar spesmiloj) por unu tago por unupersona ĉambro; sama ĉambro kune kun banoĉambro, du ĝis tri dolaroj (kvar ĝis ses spesmiloj) por unu tago.

Loĝado kun manĝado (nomita «American Plan»): Tri dolaroj (ses spesmiloj) por unu persono en unu ĉambro; kvin dolaroj (dek spesmiloj) por du personoj en unu ĉambro. Banoĉambro kostas unu dolaron (du spesmilojn) plu.

Kelkaj aliaj hoteloj donos pli malkaran prezon, sed ili ne estas tiel proksime de la kongresaj sidejoj. Sed la komitato povas aranĝi por loĝado kaj manĝado en bona hotelo po du dolaroj (kvar spesmiloj) por unutaga loĝado kaj manĝado.

Aldone, la komitato ankaŭ aranĝas por loĝado kaj manĝado en loĝejoj, pensionoj, k. t. p. La komitato havos multajn ĉambrojn, bonajn kaj purajn, en suface bonaj lokoj, po kvar dolaroj (ok spesmiloj) por unu semajno, kaj ankaŭ unu aŭ kelkajn manĝejojn, kie oni ricevos bonajn manĝojn po kvin dolaroj semajne. Kompreneble oni povas loĝi ĉe la «Arlington», aŭ alia hotelo, kaj manĝi aliloke.

Skribu al la komitato, se vi volas antaŭaranĝi pri loĝado, kaj skribu klare kaj plene, kion vi deziras. La komitato penos plenumi viajn dezirojn. Adresu la Sekretarion, Sro. Edwin C. Reed, *Chamber of Commerce, Washington, D. C., Usono.*

*Kartoj, Poŝkartoj, Kongresmarkoj.* — La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedanton en ĉiun oficialan kunsidon kaj feston de la Sesas estas nun aĉeteblaj ĉe la Sekretario, en Washington, kaj ankaŭ ĉe la *Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris.* La prezo de ĉi tiuj kartoj estas kvin dolaroj (dek epesmiloj), el kiu la duono (kvin epesmiloj) estos redonata al ĉiu, kiu venos el alia kontinento ol Norda Ameriko.

La belaj kongresmarkoj estas nun aĉeteblaj po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por cent markoj, afrankite. La serio de dek kvin poŝtkartoj, de Washington'aj vidindaĵoj (Esperante pri-skribitaj) kostas dudek kvin cendojn (duonon da spesmilo),

## LA URBO WASHINGTON

Washington estas unu el la plej belaj urboj en la mondo, enhavante proksimume tricent mil loĝantojn, kaj estas fama pro sia pureco, larĝaj stratoj kaj aleoj, belegaj arboj, pitoreskaj parkoj, majestaj konstruaĵoj el marmoro kaj granito, multaj lokoj interesaj,

inter kiuj estas la Blanka Domo, kiu estas la loĝejo de la Usona Prezidanto; la Kapitolo, kie kunvenas la Usona Kongreso; la Biblioteko de Kongreso, la plej bela kaj granda en la mondo; la Monumento de Washington, 171 metrojn alta, kiu estas la plej alta masonaĵo en la mondo, kaj havas interne rapidan elevatoron, kiu portas la pasaĝerojn ĝis la alteco de 155 metroj; la Nacia Trezorejo kun ĝiaj grandaj kasejoj; belegajn konstruaĵojn de la registaraj departementoj; la Corcoran (korkoran) Artgalerio; la Smithsonian'a, Nacia, kaj Kuracarta Muzeoj; Botanikaj Ĝardenoj; Zoologia Parko, k. t. p. En ĉiujn ĉi la enirado estas senpaga.

Aŭgusto estas nomata en Washington la «Monato Turista», ĉar ordinare estas pli multe da vizitantoj, ol en ĉiu alia sezono de la jaro. La vetero dum Aŭgusto estas modere varma, la vesperoj estas malvarmetaj kaj refreŝigaj. Estos multaj plezuroj, ekzemple, ekskursoj lunlumaj al la Grandaj Akvofaloj de la Potomac (potomak) Rivero, al Glen Echo (glen eko), al Chevy Chase (ĉevi ĉejs) Lago, k. t. p. kaj veturadoj laŭ la bela Potomac Rivero per boatoj provizitaj je muziko, dancado, manĝetoj, kaj aliaj amuzaĵoj por la pasaĝeroj.

Ekskursoj estos aranĝitaj al Mount Vernon (maŭnt vernon), la originala domo kaj tomo de George Washington, kie oni povas vidi la meblaron, k. t. p., kiun li uzis dum sia vivo, ĝuste kiel ili estis antaŭ cent kvindek jaroj; al Arlington Cemetery; al Chesapeake Beach (ĉesapik biĉ), Cabin John Bridge (kabin ĝon briĝ), kiu estas la plej longa ŝtonarko en la mondo, Alexandria (alekzandria), la Nacia Hejmo por maljunaj soldatoj, Militŝipa Haveno, k. t. p. Je distanco de unu horo de Washington estas bonega salakva banado.

## LA LITERATURA KONKURSO

### KONDIĈOJ

1. Ĉiu verko devas esti originala. Nenia traduko estos akceptita.
2. Neniu manuskripto estos akceptita por pli ol unu konkurso.
3. Neniu manuskripto estos akceptita se ĝi jam estas plene aŭ parte publikigita antaŭ la disdonado de la premioj.
4. Se laŭ la opinio de la juĝantaro neniu sufiĉe bona manuskripto estas ricevita por iu konkurso, la juĝantaro havos la rajton malakcepti ĉiun manuskripton kaj ne doni la premion. Ili redonos tiun premion al la donacinto.
5. Ĉiu premiita verko apartenos al la donacinto de la premio,

dum unu jaro post la Sesa Kongreso, se la donacinto ne alie anoncas. Se la donacinto ne publikigis ĝin antaŭ la fino de tiu jaro, la verko tiam apartenas al la aŭtoro, kaj ne plu al la donacinto.

6. Post la Konkurso, la nepremiitaj manuskriptoj estos resendataj al tiuj aŭtoroj, kiuj antaŭ la 1a de Oktobro, 1910, sendos la necesan monon por pagi la poŝtan elspezon.

7. La verkoj devas esti skritaj sur *unu flanko* de la papero. Manuskriptoj skribmaŝine skribitaj ricevos la plej zorgan konsideradon. La juĝantaro rajtos tute ignori nelegeblajn manuskriptojn.

8. Sur ĉiu manuskripto devos esti skribita, krom la titolo, nur iu elektita pseŭdonimo de la aŭtoro. Fermita koverto, en kiun la aŭtoro metos sian nomon kaj plenan adreson, kaj sur kiu estas skribita nur la titolo de la temo kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro, devos akompani ĉiun manuskripton. Oni povos ankaŭ laŭvole meti la resendpagon en tiun koverton.

9. Ĉiu manuskripto devos esti ricevata de la Konkursa Komitato ĉe la Ĉambro de Komercio, Washington, D. C., Usono, antaŭ la 1a de Julio, 1910. La sola escepto estas, ke manuskriptoj de la «specialaj» juĝantoj (anŝtataŭ la Kongresa Juĝantaro) devos esti sendataj rekte al tiuj juĝantoj. Sed la koverto enhavanta la nomon kaj adreson devos esti samtempe sendata al la Konkursa Komitato en Washington.

10. La juĝado estos farita de la Kongresa Juĝantaro, kaj ankaŭ de «specialaj» juĝantoj. La Kongresa Juĝantaro konsistos el Esperantistoj zorge elektitaj de la Organiza Komitato, laŭ la propono de la Konkursa Komitato.

«Specialaj» juĝantoj estos tiuj Esperantistoj, kiujn eble la donacintoj de premioj por verkoj pri pli-malpli teknikaj temoj petos doni sian servon. Donacintoj, kiuj volas tiajn juĝantojn, devos antaŭe ricevi la konsenton de la dezirataj juĝantoj, kaj anonci tion al la Konkursa Komitato samtempe kun la temo kaj premio proponitaj. Se la temo kaj premio estas akceptitaj de la Konkursa Komitato, la speciala juĝanto (aŭ specialaj juĝantoj) estos akceptita, kaj ties decido estos plene aprobata de la komitato. La «specialaj» juĝantoj sendos al la komitato en Washington ĉiun ricevitan manuskripton kune kun la anonco pri sia decido.

11. La Konkursa Komitato donos la manuskriptojn al la Kongresa Juĝantaro, kolektos ilin, faros liston de decidoj, kune kun la decidoj de «specialaj» juĝantoj, kaj fine malfermos la kovertojn, kiuj enhavas la nomojn de la aŭtoroj, por fari ĉiun aranĝon pri la anoncado kaj la festo por la disdonado de premioj.



12 Neniu juĝanto partoprenos en konkurso por kiu li mem estos unu el la juĝantaro.

La Organiza Komitato proponas la jenajn temojn kaj medalojn al la premiitoj:

*Universala Frateco.*—Prozaĵo de 1,000-2,000 vortoj. Versaĵo de 20-50 linioj.

*Rakonto* (prozaĵo de 2,500-3,000 vortoj).

*Rakonto* (prozaĵo de 2,500-3,000 vortoj) verkita de junulo aŭ junulino inter la aĝoj de 15-20 jaroj.

*La Simileco inter Zamenhof kaj Lincoln.*—La verkoj de Zamenhof, lukse binditaj.

*La Utileco de Esperanto por Blinduloj.*—«Braille» libroj (speciala juĝanto, Prof. Cart, 33, Rue Lacépède, Parĭs, Francujo).

*Traktato pri la Biblio.*—Proponata de Ulysses G. B. Pierce, Pastro de la Usona Senato.—Libro de Sintezaj Lekcioj pri la Biblio, aranĝita de la pastro mem, kun antaŭparolo de Edward E. Hale, fama antaŭa Senatpastro. En la libron estas metita aŭtografletero de D-ro Hale.

*La Utileco de Esperanto en la Komercio.*—Proponata de la Washington a Ĉambro de Komercio.—Arta objekto je la valoro de dudek spesmiloj.



Oni ne devas admiri ĉe la homoj iliajn vestojn; nur iliajn bonajn morojn.

\* \* \*

Ju pli malproksime de la malpura urbo loĝas la homoj, despli ili estas pli fortaj kaj pli liberaj.—*P. U.*

\* \* \*

Estas pli elportebla la morton sen pensi pri ĝi, ol la pensado pri la morto estante sendaŭgere.—*El Pascal.*

\* \* \*

Pli frue la vanteco trudas al ni agi kontraŭ nia volo, ol la prudento.

## ENLANDA MOVADO

### BARCELONA

La 24<sup>an</sup> Aprilon lastpasintan, okazis mara ekskurso organizita de la societo «Espero Kataluna».

Ĉirkaŭ 200 gesamideanoj enŝipiĝis en *Golondrina* (nomo de la ŝipo) kies posedanto Sro. Anglada, nia kara samideano, bonvolis donace meti ĝin sub la Esperantistara dispono dum la mateno de la dirita tago; tial ni dankas tium malavaran samideanon.

Kun esperantaj flagoj, turnigante ĉies atenton al ni, ni pasigis tre agrablan matenon, interbabilante pri ĉiaspecaj aferoj, ĉar en tiu gaja kunveno kune troviĝis belaj fraŭlinoj, fraŭloj, gemaljunuloj, k. t. p.

La laborema esperantista grupo «Semo» de Ateneu Enciclopedic Popular organizis esperantgazetara ekspozicio, kies inaŭguracion oni okazigis la 7<sup>an</sup> de la ĵuspasinta Majo per plaĉa koncerto farita de kvinteto, kies anoj estas la junuloj Sroj. Solsona, Baell, Ametlla, Mullor kaj Escofet, kiuj aplaŭdinde ludis muzikaĵojn de Beethoven, Mozart, Bertini, Mendelsohn, Chopin kaj nia himno *La Espero*.

Por ke vi povu konsideri la gravecon de ĉi tiu ekspozicio, ni nur devas sciigi al vi ke ĝi konsistas el ducent tridek malsamaj esperantaj gazetoj, kion ni ŝuldas precipe al la malavareco de la kolektantoj Sroj. Bacardit kaj Amades.

La Esperantista grupo «Ĉiam Antaŭen», el Clot (Barcelona), organizis, la 10<sup>an</sup> de Aprilo, frumatenan ekskurson tra Horta kaj Sant Ciprià.

Estis ĉirkaŭ tridek kvin geesperantistoj el «Ĉiam Antaŭen», «Espero Kataluna» kaj «Esperanta Frateco», kiu entuziasmigitaj praktikadis esperanton, sin amuzante.

«Espero Kataluna» inaŭguros en sia nova sidejo (Tallers, 81, pral.) sep kursojn de Esperanto, por viroj kaj por virinoj.

La grupo «Barcelona» ankaŭ malfermis du novajn kursojn.

La grupo «Kvinpinta Stelo» elektis por la nuna jaro la jenan komitaton: *Honora Prezidanto*, Dro. Zamenhof; *Prezidanto*, Sro. M. de la Fuente; *Vic-prezidanto*, Sro. E. Budi; *Sekretario*, Sro. J. Llorach; *Vic-sekretario*, Sro. D. Viger; *Kasisto*, Sro. J. Valero; *Kalkulisto*, Sro. C. Pipó; *Bibliotekisto*, Sro. J. Escandell; *Voĉdonantoj*, Sroj. J. Agell, S. Puig, B. Asencio kaj P. Corba.

*Esperantistaj Vendredoj.* — Grupo esperantista de «Ateneu Enciclopedic Popular».

Plezure mi akceptas la taskon raporti al la K. E. la laboron de la Esperantistaj Vendredoj; tio kion mi neniam akceptos, estas la neĝustaj frazoj, kiujn Sro. Dalmau direktis al mi en tiuj ĉi paĝoj, pro tio ke mi ne raportos pli bone ol li.

1<sup>an</sup> de Aprilo: interdiskutado. Temo: «Ĉu la Esperantistoj devas partopreni en la Barcelonaj Majaj festoj?»

Interesa polemiko, en kiu partoprenis Sroj. Pujulà, Dalmau, Bacardit, González, k. t. p.

La ĉefa konkludo estas la neceseco ke la Esperantistoj zorgu la eldonigon da Esperantaj programoj dum venontaj festoj.

8<sup>an</sup> de Aprilo. Antaŭ amaso de geesperantistoj kiuj okupis tute nian grandan salonon, Sino. H. de Chalmot, faris tre belan paroladon. Duonŝerco kaj serioze, ŝi rakontis al ni, serion da amuzaĵoj, kaj okazintaĵoj, ĉiam nepraj dum longaj vojaĝoj, kiel en la karavano de la «U. E. A.» al la V<sup>a</sup> Kongreso, temo de tiu ĉi parolado.

Ŝi ankaŭ pentris al ni, per tre belaj frazoj, la ĉarman fratecon, la armonion, kaj entuziasmojn, kiujn neniam mankas inter la diverslandaj esperantistoj, tuj kiam sin trovas kunigitaj por plej kreskigi Esperanton.

15<sup>an</sup> kaj 22<sup>an</sup> de Aprilo: interdiskutadoj. Temo: «La plej efikaj rimedoj por la propagando de Esperanto en Barcelono.»

En tiuj ĉi Esperantistaj Vendredoj, okazis gravaj diskutoj. Oni pritraktis la «Esperantista Barcelona Societo». Ĝia zorganta komitato aŭdis, dum tiaj kunsidoj kuraĝigajn konsilojn, kaj aprobajm parolojn, al ilia ideo.

Partoprenis Sroj. Urbez, Dalmau, Pellicer, Bacardit, González, Bermudes, k. t. p.

La 20<sup>an</sup> Aprilon okazis interesa konferenco de Sro. Dalmau, pri la Federacio.

La graveco de tia temo, pro tio ke estis la unua fojo kiam oni parolis pri la «K. E. F.» publike kaj ĝenerale, altiris ĉe nia grupo, malgraŭ la pluvema nokto multajn samideanojn.

Sro. Dalmau religie aŭskultita, klarigis per facilaj kaj konvinkigaj argumentoj la celon, kaj la laborojn de «K. E. F.», kaj rimarkis la necesecon de unuiĝo inter la katalunaj Esperantistoj por atingi en nia lando la plenan sukceson de nia sankta afero.

Se ni povas kalkuli la simpatiojn de la Federacio, ĉe Barcelono, per tiu ĉi Esperantista Vendredo, ni povas certigi servertime ke la plej brilanta sukceso kronigos la klopodojn de la Barcelona Delegito. — A. B.

#### TERRASSA

Celante enkonduki Esperanton ĉe la infanaro, por konkeri la morgaŭulojn en la vicoj de la militanta Esperantismo, «Lumon» decidis krei

grupeton por infanoj kies sciigo mi jam raportis en la pasinta numero, kaj kies inaŭguracia festo okazis la 1<sup>an</sup> de la Maja monato ĉe la salono de la «Jóventut Catolica» de tiu ĉi urbo.

Sro. Cases sendis leteron bedaŭrante sian neĉeeston. Sroj. Pujulà kaj Terricabras, sendis kuraĝigajn leterojn, esprimante sian bondeziron por la ĵus naskiĝanta junulgrupeto.

Junuloj deklamis kelkajn tradukaĵojn jenmaniere: *En la nit*, katalune, J. Bertran; *La Rozeto*, kat.-esp., R. Rodó; *Mi rakontis*, kat.-esp., F. Ballbé; *La sankta graalo*, kat.-esp., D. Badiella; *La sangaj strekoj*, kat.-esp., S. Gotsens; *La Blindulineto*, kat.-esp., fraulineto R. Ortiz.

Samtempe partoprenis ĉi tiun feston: ano el «Aplec» de Sabadell, kiu trafe parolis pri *La pau i germanor universal, fi primordial de l'Esperantisme*.

Sro. Graells legis kelkajn pravajn amuzajn konsilojn dediĉitajn al la geinfanoj, kiujn li eltiris el la observado de la infanoj. «La Homaro atendas de vi — li diris — vian frukton; vi fruktos. Dume ĝoju, ridu, ĉar estas tempo por ridi kaj ĝoji; sed ne bedaŭru morgaŭ la kruelan, kaj veran vivadon, kiu aperos antaŭ vi, sin trudante minacega, terura, sed homa kaj pasia.»

*Esperantiano*, raportis detale pri Esperantismo kaj «U. E. A.»

Sro. Ferrer klarigis la nekompreneblan timon kiun havas la plimulto kiam kredas kontraŭbonon la interfratiĝado de malsamaj popoloj. Li certigis ke la civilizacio dum ĉiuepokoj devenis de la maro, sed malgraŭ la homoj obstine venkis la mardanĝerojn ili ne povis sin kompreni, ili parolis malsame; nun ni homoj el ĉiesflankoj de la mondo, nin komprenas dank'al Esperanto.

Fine, la aninoj de «Lumon» donacis standardeton al la novgrupeto «Esperantista Junularo» bele ornamita kaj zorge brodita. Sino. Sicart legis entuziasman saluton kaj donis ĝin al la Prezidanto de «E. J.». Sro. Jozefo Girona gratulis la esperantistinojn pro tiu multvalora donaco «kiu — li diris — estos nia orientstelo kiu montros al ni la veran vojon.» Ni tion esperas.

Finiĝis ĉi tiu ĉarma festo per nia himno *La Espero*. — LA DELEGITO.

## REUS

La saĝa laboro de niaj bonvolaj samgrupanoj, ĉiutage multe progresas aliĝinte al nia grupo kelkaj novaj samideanoj.

Je la 30<sup>a</sup> Aprilo la ĉi tiea societo «Centre de Lectura» fermis siajn kursojn, t. e., la kursoj de Esperanta, Franca kaj Angla lingvoj.

Pro tio oni organizis fratan tagmanĝon kiu okazis la pasintan dimanĉon en kampdomo de Nova Sem'ano, toastinte dum ĝi por la grandaj progresoj kiun faras la Zamenhofa lingvo en Katalunlando per la «Kataluna Esperantista Federacio». — LA DELEGITO.



## MATARÓ

Jus fondita en tiu ĉi urbo la unua esperantista grupo sub la nomo «Stelo de Mataró», malfermiĝis kurso partoprenata de 30 gelernantoj. Je la dimanĉo 15<sup>a</sup> de Majo iris tien delegitoj de la Societoj jenaj: de «Esperanto kaj Patrujo», Sro. Anglada; de «La Kvinpinta Stelo», Sro. Valero; kaj de «La Rondo», Sro. Bermúdez, kiuj estis afablege akceptitaj de la Mataró'anoj. La restejo de la supre citita grupo estas ĉe «Foment de la Sardana». La saman tagon okazis tre simpatia noktofestoj inaŭguracia en kiu oni diris diversajn propagandajn paroladojn kaj legis esperantajn poeziojn, kiujn estis varme aplaŭdataj de la multenombra ĉeestantaro; poste okazis dancado, en kiu «La Rondo» ludis la ĉefan rolon. Ni deziras plej plenan sukceson kaj grandajn progresojn je la tasko esperantigi tiun gravan lokon de nia lando.

## IGUALADA

Jen la novaj komitatanoj de la grupo «Katolika Idealo» de tiu ĉi urbo kiu havas sian sidejon ĉe la societo «Centre Catolic Obrer».

*Prezidanto*, Sro. Bonaventura Rafegas; *Vic-prezidanto*, Sro. J. Serra Abadal; *Sekretario*, Sro. Gabriel Castellà; *Kasisto*, Sro. Ramon Miserachs; *Bibliotekisto*, Sro. Pere Botet.

La societanoj sekvas kun granda intereso la disvolviĝado de Esperanto, sed speciale de nia kara «K. E. F.». — G. C.

## PALMA

Malgraŭ la el la ĵurnaloj eltirita novaĵo alvenos iom malfrue ĉe la samlandanoj, ni devas anonci ke en kataluna konkurso okazonta en Palmá de Maljorko, estas la jena temo proponita de la «Klubo Palma»: *L'Esperanto com a medi d'expressió de les noves idees.*

La konkurso kiu plej bone trafos estos premiata per artaĵo.

Oni devas sendi la manuskriptojn al Sro. Nicolau Dameto Cotoner, *Sekretario*, strato Samaritana, antaŭ la 10<sup>a</sup> Junio.

Ni fidas ke niaj samideanoj ĝustatempe sciigis pri tiu ĉi konkurso kaj espereble la temo nek restos dezerta, nek sen trafi.



GAZETARO

Interŝange ni ricevis la jenajn gazetojn:

*Rumana Esperantisto* (oficiala organo de la «Rumana Esperantista Societo»): n<sup>o</sup> 1, 2, 3, 4.

*Mitteilungen*, el Dresdeno: Januara, Februara, Marta kaj Aprila numeroj.

*Nova Sento*, el Bilbao (organo de la «Vaska Esperantistaro»): Aprilo.

*La Londona Gazeto*: Aprilo. (Organo de la Federacio de la Londonaj Grupoj Esperantistaj).

*Pages Folles*: 24<sup>an</sup> Aprilon 1910<sup>a</sup>. Administrejo, 92, rue Saint-Lazare, Paris.

Tiu-ĉi franca ĉiusemajna bonhumora gazeto ekmalfermas grandan konkurson de rebusojn en ses serioj por geesperantistoj.

La celo de tiuj konkursoj estas — laŭ la franca teksto — la jena:

«Ĉar Esperanto estas el ĉiuj pruvoj de internaciaj lingvoj ĝis nun aperintaj tiu, kiu pli da adeptoj varbis, ni juĝas utila liveri al esperantistaro okazon por sin kalkuli.

La elpruvo ne povus esti entreprenata de la specialistoj, pro tio, ke ĝi konservus la karakteron de scienco eksperimenteja elpruvo.

Estas elpruvo publika kinn ni entreprenas. Ni donas al ĝi la formon de rebusa konkurso. Kaj per kuraĝigi la seriontojn, ni difinis serion da belaj premioj por la venkontoj. La turniro daŭros ses semajnoj (t. e. ĝuste ses numeroj de *Pages Folles*). Oni nur devastrafi la rebuson apudestantan kaj tiujn, kiuj estos publikigitaj en la kvin sekvantaj numeroj post aperontaj. La hodiaŭa estas sentenca frazo. Iom da studo kaj duonkonado de Esperanto sufiĉos por trafi ĝin. Ni senpartie konstatos la nombron de geesperantistoj kiuj estos partoprenintaj en la konkurso. Ni troe ne scios admoni la partianojn de la internacia lingvo tion entrepreni malgraŭ ili nur solvus unu el la proponitaj problemoj. Tio estos amuzado samtempe ol publika manifestado kiun ni organizas je ili. Ni diros, plie por fini, ke la problemoj estis verkitaj de unu el la plej famaj esperantistoj.

La premioj estas 50.»

Tiu-ĉi gazeto poste klarigas ke la legontoj de ĝi ne konantaj nian Zamenhofan lingvon ricevos aŭfrankitan ŝlosilon, laŭ mendo.

Ni opinias ke tia gazeto trafis bonan rimedon por la vendado de ĝi, ĉar estas ne dubebla ke multaj gesamideanoj partoprenos en tiu ĉi konkurso. Ĝi ja estos taŭga propagando de nia lingvo, certe, sed estos ankaŭ tiu-ĉi gazeto kiu eltiros plej grandan profiton ol Esperanto. Tamen ni ne malaprovas tian konkurson: tute ne. Ĝi elmontras ke nia movado estas grava, kaj multenombraj niaj samideanoj, kaj plie, ke Esperanto perfekte taŭgas por la komerco-propagando.

Per tiu konkurso tute simple oni liveros al ni pruvon de ĝia komerc-utileco. Ni marŝas!

*Sveda Esperantisto* (oficiala organo de la «Sveda Esperantistaro»): Aprila numero.

*Esperanto-Nouvelles* (trimonata folio por propagando kaj informoj de Esperanto): Aprila numero.

*La Propagandisto* (trimonata propaganda folieto organo de la «Internacia Propagandejo Esperantista», de Londono): Marta numero.

*Normanda Stelo* (monata bulteno, organo de la «Esperantista Federacio de Normande»): Maja numero.

*Lorena Stelo* (monata gazeto, organo de la «Francorienta Esperantista Federacio»): Aprila numero.

*Rumana Gazeto Esperantista* (organo de la «Esperantistaj societoj el Rumanujo»): Maja numero.

*La Suno Hispana*. Direktoro: Sro. A. Jiménez Loira. Pintor López, 3, Valencia. Maja numero.

*Ĉirkau la Mondo* (monata gazeto, germane redaktita de Prof. Dr. Siegfried Lederer): Januara, Februara, Marta, Aprila kaj Maja numeroj.

*Ruslanda Esperantisto* (oficiala organo de la «Ruslanda Esperantista Ligo»): Marta numero.

*Germana Esperantisto* (monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto, kaj oficiala organo de la «Germana Esperanto-Asocio»): Januara, Februara, Marta, Aprila kaj Maja numeroj.

*Gazeto Anda'uzia* (esperanta monata revuo): Maja numero.

*Semo* (monata gazeto, eldonata de la grupo «Paco kaj Amo»): Maja numero.

*Pola Esperantisto* (monata organo de polaj esperantistoj): Januara, Februara kaj Marta numero.

*Tutmonda Espero* (monata revuo eldonata de la societo «Espero Kataluna»): Maja numero.

Al ĉiuj ni dankas pro ilia ĝentileco, kaj precipe al kiuj laŭdis nian modestan publikajon. Koran saluton kunbatalantoj!



## OFICIALA PARTO

La Redacción de K. E. prega a tots els federats que dispensin el retras en la sortida d'aquest número, puix a causa de l'agombolament de treball no ha pogut sortir amb l'acostumada puntualitat.

Reunits, els senyors nomenats per formar el Consell Directiu durant el curs 1910-11, en el domicili del Dr. D. J. Bremon Masgrau, després d'un

breu exordi de D. Joan Piferrer (administrador dintre 'l Comitè Provisional i reelegit per a formar part del nou) donant comptè de l'estat i marxa de «K. E. F.», acordaren desempenyar els carrecs en la següent forma:

*President*, Dr. D. Bremon Magrau (Barcelona); *Viç-President*, D. J. Delclòs (Vic); *Secretari*, D. J. Pujol Montfort (Barcelona); *Caixer-Administrador*, D. J. Piferrer Rifa (Sabadell); *Comptador*, D. V. Alavedra (Terrassa).

Dits senyors immediatament prengueren els següents acords:

1.<sup>ª</sup> Donar les gracies a l'Ajuntament de Tarragona per son oferiment, i notificar-li l'acord del Congrés de celebrar el segon a Tarragona.

2.<sup>ª</sup> Notificar a tots els agrupaments esperantistes de Catalunya, la constitució del Comitè Directiu de «K. E. F.», i comunicar els nomenaments que's feren a Sabadell, an els respectius interessats.

3.<sup>ª</sup> Distribuir-se 'ls treballs del Comitè en forma que'n surti beneficiada la bona marxa de «K. E. F.» i sa propaganda, reunint-se per a aitals motius sempre que'l senyor President ho cregui convenient.

El Comitè saluda coralment a tots els esperantistes sens distinció, i espera dels que formen part de «K. E. F.» llur apoi moral i material per a assolir el grau d'esplendor a que es acreedora nostra institució.

A prec's d'alguns esperantistes socis de «K. E. F.», aquesta Administració posarà desde aquest número la nostra revista a la venda; emperò, tenint en compte que aquesta publicació es solament per als senyors socis, son preu serà 'l següent:

Tot federat que'n necessiti algun exemplar, a més del que se li envia, el podrà adquirir per 20 centims de pesseta; i, tot comprador no federat, mitjançant 40 centims.

A Barcelona, estarà encarregada la venda a la llibreria den J. Rosals (Porta-ferritça, 30); i, per a les demés poblacions, pot reclamar-se an els respectius delegats, o directament an aquesta administració.

Sens dubte 'ls nostres llegidors observaran que la qualitat del paper amb que's confecciona la nostra revista no es igual an els dels dos números anteriors.

Apart de que s'hi han posat cobertes, que portaran desde ara tots els números, ens hem vist obligats a canviar el paper, per l'excessiu pes que representava, lo que ens exigia una gran despesa en franqueig postal.

No obstant, creiem que tothom veurà amb gust la reforma introduïda.

La Redacció de K. E. prega a tots els delegats que tinguin la benvolença d'enviar les ressenyes del moviment esperantista de llurs localitats abans del dia 20 de cada mes, car després tot es agombolament de treball; i que 'ls originals siguin escrits sols d'una cara, i amb lletra intel·ligible.